

La Homo Kontraŭ Babelo

Ĝi estas la titolo de nova ekspozicio en Esperanto-muzeo en Svitavy (Ĉeĥio). Tiu estas dediĉita ĉefe al ĉi-jaraj jubileuloj de la Esperanto-movado, nome al la iniciatinto de Esperanto L. L. Zamenhof kaj du elstaraj ĉeĥaj pioniroj, Francisko Valdomiro Lorenz (1872-1957), poligloto scipovinta 80 ĝis 104 lingvoj, kiu en la jaro 1890, kvankam malriĉa studento, proprakoste eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj, kaj kiel 20-jarulo elmigris al Brazilo kie li vivis kaj verkis ĝismorte. La dua estas pedagogo Theodor Čejka (1878-1957), la aŭtoro de lernolibroj kaj unuaj vortaroj, sed ankaŭ eldoninto de la unuaj Esperanto-gazetoj en Ĉeĥio. Aktualigita estas ankaŭ la „daŭra“ parto de la ekspozicio.

La aranĝo okazis lige al la Muzea kaj preĝeja nokto en Svitavy, kiam estis malfermitaj kaj senpage alireblaj krom la Esperanto-muzeo ankaŭ la Urba muzeo kaj galerio (parenteze: ene de ĝi estas daŭra ekspozicio pri la plej konata naskito de Svitavy kaj savinto de multaj judoj Oskar Schindler) kaj kvin preĝejoj – ĉie kun riĉa programo preparita por la vizitantoj.

La inaŭguro de la ekspozicio okazis dufoje: vendrede la 9an de junio en la ĉeĥa, sabate la 10an en Esperanto, kun similaj programoj. Krom propra inaŭguro de la ekspozicio kun enkondukaj vortoj de la ĉefaranĝanto de la ekspozicio Pavla Dvořáková, okazis du prelegoj. La unua de Petro Chrdle pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz estis sekvata de lanĉo de du lingvaj versioj de la verko fare de prof. Vlastimil Novobilský „F. V. Lorenz. Atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo“, kiun el la ĉeĥa originalo esperantigis Margit Turková. En la dua prelego Jano Vajs (SK) prezentis siajn travivaĵojn en Nepalo dum la Himalaja renkontiĝo. La sabatan programon, jam en Esperanto, riĉigis Bernhard Tuidler, kiu prezentis la Esperanto-Muzeon en Vieno, kies estro li estas, kaj Laŝa Ĉaĥunaŝvili el Kartvelio, momente staĝanta ĉe E@I, prezentinta la retejon zamenhof.info, kiu prezentas nian majstron jam en multaj lingvoj, danke al la tradukintoj L. Ĉaĥunaŝvili en la kartvela kaj al Petr Diblík ankaŭ en la ĉeĥa.

Riĉaj estis ankaŭ vesperaj programoj. Vendrede, kadre de la kultura vespero, preparita de la svitavanoj, al la loka publiko prezentigis ankaŭ L. L. Zamenhof en plenumo de Jan Řepa. Sabate okazis koncerto de la muzikgrupo *Noproblem*, kiu kantas ankaŭ en Esperanto. Dum la koncerto estis lanĉita ĝia dua kompaktdisko en Esperanto.

Inter la ĉeĥa publiko, vendrede, ĉeestis ankaŭ la urbestro kaj bibliotekistino de la urbo Vrďy, al kiu nun apartenas la naskiĝvilaĝo de F. V. Lorenz Zbyslav. Ili post la prelego pri Lorenz tuj surloke mendis ĝin ankaŭ por lia naskiĝloko kaj eĉ trovis por ĝi konkretan aŭtunan daton. La sabatan Esperanto-parton ĉeestis krom ĉeĥaj esperantistoj ankaŭ eksterlandaj gastoj el Ĉinio, Aŭstrio, Francio, Japanio, Kartvelio, Pollando kaj Slovakio.

La nuna ekspozicio daŭros ĝis septembro 2018, kiam ĝin anstataŭigos ekspozicio omaĝe al la dekjariĝo de la muzeo. Pli da informoj kaj fotoj troveblas ĉe www.muzeum.esperanto.cz. Eksterlandaj gastoj estas ĉiam bonvenaj. Ja ne nur la menciitaj du muzeoj, sed ankaŭ la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havas multon interesan por oferti. Planante vian viziton bonvolu anonciĝi anticipe ĉe muzeo@esperanto.cz. La plej proksima okazo por ĝui en Svitavy Esperanto-etoson estos ekde la 22a ĝis la 29a de septembro, kiam tie okazos Internacia Esperanto-Renkontiĝo.

Teksto: Petro Chrdle, fotoj: Vlado Škuta